En la jaro 1932, dum aŭto-ekskurso mi ekvidis grandan afišon kun fremdlingva teksto, kies enhavon mi — je mia miro — almenaŭ duone komprenis kaj la plejparton de la resto mi povis diveni laŭ la senco. Sed ĝi ne plaĉis al mi pro la granda nombro da diftongoj: -aŭ, -oj, -loj, -poj. Tamen ankoraŭ nun mi memoras ĝian titolon: „Cu vi jam vizitis la glaciokino de Dobšiná?” (Temis pri glacia groto de D.). Pli poste mi eksciis, ke ĝin eldonis la Direkcio por Fremdultrafiko en Bratislava, kiu en Hindujon sendis slovaklingvajn afišojn kaj la anglajn kaj esperantlingvajn dispendigis tra Slovakio.

Post nelonga tempo la kontraŭtuberkulozan sanatorium en Nový Smokovec en Altaj Tatroy, kie mi estis ĉefkuracisto, vizitis grupo da fremdlandanoj (Dano, Finno,

Nederlandano, Svedo) kun slovaka interpretisto el Bratislava. Mi devis doni al ili klarigojn pri la kuracado de la pulma kaj aliorgana tuberkulozo, pri la efiko de la altmontara klimato kaj pri la malsanasekuro en nia lando. Denove mi aŭdis la lingvon por mi plejparte kompreneblan (ĉar temis ja pri traduko de miaj vortoj). La interpretisto diris, ke la gastoj estas fervojistoj kaj interparolas esperantlingve.

En Altaj Tatroy vizitis min D-ro Gejza Vámoš, slovaka verkisto kaj mia kunlerninto en la Medicina Fakultato en Prago. Bedaŭrinde li ne malkaſis al mi, ke li estas fakdelegito de UEA por la mond fama banloko Piešťany. — Dum ekskurso de turisma komisiono en Altaj Tatroy mi interkonatiĝis ankaŭ kun D-ro Aŭgusteno Pitlík, reprezentanto de Ministerio por Enlanda Komerco, en Prago, sed — bedaŭrinde — ankaŭ pri li mi eksciis nur multe pli poste, ke li jam en 1921 traveturis Eŭropon helpe de Esperanto. Kaj tiam mi estis redaktanto de ilustrita porturisma revuo Krásy Slovenska (Belajoj de Slovakio), subkonscie jam preta akcepti kaj uzi Esperanton.

Tio okazis nur en 1946, kiam mi loĝis en Martin jam 9 jarojn kaj en la gazetstando tute hazarde ekvidis la 1-an n-ron de la revuo Esperantisto Slovenska, kiun eldonis Ernesto Váňa en Žilina kaj laŭ kiu ekzistis tie jam granda aro da esperantistoj. Sed la 2-an n-ron mi devis longe, longe atendi. Jarfine mi ricevis leteron de Ján Lamačka el Trenčín, ke el la arkivo de Krásy mi pruntedonadu klišojn por E. S., pri kiu ekde nun devas zorgi li.

Je la demando, kiamaniere mi povus eklerni Esperanton, li respondis: „Ĉu vi, Martinano, ne scias, ke en via urbo vivas eminenta esperantisto, instruisto kaj verkisto Ján Valaš'an Dolinský . . . ?" Mi vere ne sciis, ĉar dum tiom da jaroj mi nenie vidis atentigon pri la Lingvo Internacia. Do kun Lamačka ni vizitis la direktorion de la tiam Popola Lernejo, kiu komence de 1947 okazigis kurson kaj je mia peto la duan en majo-junio.

Mi tuj ekagis: en la de mi redaktatan revuon mi enkondukis Esperanton inter la ceterajn fremdlingvajn bildo-subskribojn kaj resumo-aldonojn. (Ĉe la tradukado efike helpis al mi JVD, ĉar mi ankoraŭ ekz. anstataŭ „kamparano" en la presaprovaĵo lasis „kampanaron"). Mi aliĝis al la 32-a UKE en Bern.

La 1-an de aprilo mi kun miaj kunlaborantoj fondis la Lokan Grupon de Slovenska Esperanto-Societo, kies prezidanto estis Paúlo Rosa en Bratislava kaj gvidanto de la organiza Sekcio Ed. V. Tvarožek en Trenčín, kiu poste transloĝiĝis en la urbon Martin.

La 14-15an de junio mi organizis la I-an Tutslovakan Esperanto-Kongreson, kun helpo de miaj lokaj kunlaborantoj, kiun partoprenis ĉiuj signifaj esperantistaj agantoj el Slovakio, eĉ gastoj el Moravio.

Inter la ĉefaj aranĝoj de la Konferenco apartenis ankaŭ granda kaj sukcesplena ekspozicio en la belega halo de Slovenska Nacia Muzeo kun helpo de la direktoro Ján Geryk, kiu en 1936 eldonis la unuan gramatikon de J. V. Dolinský. La ekspozicio fariĝis impona elmontro pri la disvatigo de nia movado tra la tuta mondo. Ĝi ankoraŭ ne trovis grandan interesigon inter la pli vasta publiko, sed por nia afero varbis akademian pentriston Martin Benka, kiu fariĝis nia fidela kunlaboranto.

En Bern mi jam reprezentis Slovenskan Esperanto-Societon kaj interkonatiĝis kun multaj eminentaj eksterlandaj gesamideanoj. La 32-a estis por mi vera altlerneja kurso de Esperanto.

Aŭtune ni oficiale fondis Slovakan Esperanto-Instituton, kiu en januaro 1968 eldonis la 1-an n-ron de la tria jarkolekto de Esperantisto Slovaka. Ĉar mi estis jam alkutimiĝinta eldonadi lokajn ka regionajn n-rojn de Krásy Slovenska, ĉi-maniere mi procedis ankaŭ ĉe la esperantlingva revuo kaj povis akiradi monon, necesan por ĝia regula aperado. Ĝi estis ŝatata kaj disvastigata ne nur en la tuta Ĉeĥoslovaka Respubliko (dediĉante siajn paĝojn al la propagando de naturbelajoj, diskonigo de la ŝanĝoj kaj socialisma konstruado en la liberigita patrujo) sed ankaŭ tra la tuta mondo tiel, ke ĝi inter siaj kunlaborantoj, precipe literaturaj, povis nombrui multe da eksterlandanoj. Kaj ĉe la redaktaj laboroj kaj en Slovaka Esperanto-Instituto tre efike kaj sindone helpadis al mi Edo Tvarožek; per siaj kontribuaĵoj ankaŭ J. V. Dolinský. En Slovakio oni parolis pri la „martina fortaj trio”. Sed mi diradis: mi estas nur pafileto, Tvarožek pafilo kaj Dolinský kanono Esperanta.

## Liptovský Mikuláš

Laŭ la propono de Esperanto-rondeto ĉe Muzeo de Janko Kráľ, Konsumkooperativo Jednota decidis nomi la konstruotan hotelon en Pribylina „Esperanto”, por honori la memoron de D-ro A. Škarvan, eldoninto de la unua Lernolibro por slovakoj. Li aktivis en Liptovský Hrádok kaj tie estas enterigita. La nova hotelo situos apud la ŝoseo kondukanta al Altaj Tatroy kaj akceptos esperantlingve parolantajn dungitojn. La hotelo estos malfermita antaŭ la internaciaj skikonkuroj de FIS en Altaj Tatroy.

La Porturisma Komisio de Distrikta Nacia Komitato — en kunlaboro kun Esperanto-rondeto ĉe Muzeo de Janko Kráľ — eldonis propagand-prospekton pri la distrikto Liptov. Interesuloj petu ĝin de la mencita E-rondeto.

## FORLASIS NIAJN VICOJN

Xenie Marková en Prago, Med. D-ro Fr. Mester en Leles, Med. D-ro M. Mlynár en Poprad, kun sia edzino; V. Anderl en Trenčín, J. Hajzok en Bratislava, Med. D-ro E. Zvarík, CSc. ĉefkuracisto-ginekologo en Martin, kiu promesis fari por ni resumojn el siafakaj novaĵoj. Plue: Stan. Kroupa, longjara membro kaj gvidinto de E-rondeto en Znojmo. Kaj 1aŭ la sciigo de E-Rondeto en Ostrava-Vítkovice, ankaŭ s-anoj Stankuš, Trombala, Chrápavý kaj Burda. Honoron al ilia memoro!

## Korespondi deziras

Mario DESKOV (30-jara), Str. Smirnenski 11, KUBRAT, Bulgario, kun ĉ. 1., pri ĉ. t. (precipe kun geceĥoslovakoj).

Atanas KONŠTANTINOV, Str. Maksim Rajković 11, VELIKO TIRNOVO, Bulgario, dez. kor, interŝ. p. m., p. k.

Nejkov KOSIN, instr. de ĥemio en mekanoteknimumo, Car Osvoboditel 10, LOVEČ, Bulgario, tre amas legi longajn kaj interesajn leterojn.

M. S. ZEITUNJAN, instruisto, KALININGRAD, Oblastnoj Glavpoŝto, ab. ja. 14, SSSR, dez. kor., iſ. librojn kaj pm. pri t.: pentroarto, sporto, kosmo, bestoj,

gardenfloroj, Li korespondas ankaŭ en la angla, franca, germana, rusa.

**17-membra dancorkestro** de Mašinfabrikoj de Turiec, ĈSSR kun 2 gekantistoj dez. iš. tutmonde danc- kaj ĵazkantojn (se eble kun naciaj motivoj).

Milada HORÁK, geologino, MARTIN, Muzeo de Andreo Kmet, Čehoslovakio, dez. iš. mineralojn kun SSSR — Ural: pegmatitojn, duoninsulo Kola — fosforitojn. Kun Madagaskaro, Indio, Cejlono: pegmatitojn. Kun Svislando: mineralojn el minvejnoj de Alpa tipo. Kun Pollando: sulfuron, minsalon.

**La fakturon por ĉi tiu 16-paĝa n-ro** volonte pagis Domo de Kulturo de Revolucia Sindikata Movado de Mašinfabrikoj de Turiec en Martin (ĝi kostis pli od 6000 Kĉs). Ni estus tre dankaj al vi, se vi povus sendi salutleterojn kaj bildkartojn al jena adreso: Dom kultúry ROH Turčianske strojárne, MARTIN.

UMELECKÉ SLOVO, mesačník pre ľudovú uměleckú tvorivost, má od 11. čísla 1967 (november) esperantskú rubriku. V novembrovom čísle prináša úvodnú stat o probléme medzinárodného jazyka, v decembrovom stručný prehľad esperantskej literatúry a od januára 1968 ukážky z esperantskej pôvodnej i preloženej literatúry vhodné na prednes na schôdzkach esperantských krúžkov, slávnostiah a akadémiách. V tejto rubrike dostanú všetky kurzy vhodný literárny materiál ako doplnok látky prebranej v kurze. Veríme, že všetci esperantisti radi siahnu po tomto časopise a materiáli v esperantskej rubrike.

UMELECKÉ SLOVO si možno objednat v redakcii (Volgogradská 8, Bratislava), u PNS a možno ho kúpiť i v každom stánku PNS. Jedno číslo stojí Kĉs 2,-.

## EJ, TILIETO...


(Ej, lipa, lipa)

Ej, tilieto, tilieto, tiliet',  
ej, vin domaĝe, tre domaĝe, knabinet',  
ke vi edziniĝis jam,  
vangojn vendis je la am' — —  
Ej, tilieto, vi verdega tiliet'!

## El la slovaka tradukis JVD

**LA HISTORIA JARO** estas la titolo de la grandformata memorlibro, eldonita en 1966, pri la solenaĵoj de la 100-jara jubileo de Matica Slovenská (1863-1963). En la preskaŭ 400 paĝa riĉe ilustrita kaj luksa publikajo tutaj 15 paĝoj estas dediĉitaj al la salut-leteroj kaj — bildkartoj alvenintaj en Esperanto el multegaj landoj de la tuta mondo. La libredo estas la unua oficiala rekono kaj samtempe propagando de Esperanto en Slovakio. Eldonis ĝin Matica Slovenská kaj presis Presejoj de Slovaka Nacia Revolucio en Martin. Prezo 38,50 Kĉs.

**V. I. Lenin kaj Esperanto** estos la titolo de la interesega kaj grava enketo, kiun ni aperigos ekde la 1-an n-ro de la X-a, jubilea jarkolekto de nia gazeto. Ĝi konfirmos la favoran sintenon de la granda revoluciulo al Esperanto kaj al la kunlaboro de esperantistoj sovetaj kaj eksterlandaj. Ĝi atestos, ke estas vera lia eldiro „Esperanto estas la latino de proleto”, kaj ke ankaŭ li mem uzis Esperanton en la brusela kongreso. La tutmondaj esperantistoj tre efike helpis venki la grandan postmilitan malsaton en USSR.



### EDUARD KÜHNL MORTIS

La 9-an de decembro 1902, 25 entuziasmaj esperantistoj fondis ESPERANTISTAN KLUBON EN PRAHA. Dum longaj jardekoj la fondintoj unu post la alia forpasis. Plej longe restis vivanta la plej granda pioniro EDUARD KÜHNL. Li naskiĝis en Praha la 16-an de majo 1884. Esperantisto li fariĝis en la jaro 1900. Li estis inter tiuj, kiujn kunvenigis en Praha la rusa samideano Seleznjev. Kühnl vidante, ke li kun sia frato ne estas solaj esperantistoj en Praha, tuj vigle eklaboris por disvastigo de Esperanto. En la jaro 1903 li kiel unua ĉeha esperantisto travojaĝis kun Esperanto Germanujon, Francujon kaj Svisujon. La Revuo de ĉehaj esperantistoj, kies li estis redaktoro kaj eldonanto, estis vere tre bela gazeto, presita sur bona papero. Ĝian vivon ĉesigis la unua mond milito. Kompleta lernolibro de Esperanto, kiu aperis en kelkaj eldonoj, estas ankoraŭ nun post plenaj 60 jaroj serĉata. Gvidlibro tra Praha, bela libro, plena da ilustraĵoj, estis el tiutempaj similaj diverslandaj eldonajoj la plej bela. Kühnl tradukis Zamenhofan Fundamenton kaj igis ĉehan eldoniston Topič eldoni ĝin.

La eksplodo de la unua modmilito trafis nian pioniron en Parizo, kie li volis

ĉeesti la 10-an Universalan Kongreson de Esperanto. Li fuĝis en Hispanujon, kie li partoprenis la laboron por liberigo de la ĉeĥa nacio. Reveninte hejmen post la fino de milito, li kiel oficisto de ministerio por eksterlandaj aferoj ekdeĵoris kiel diplomata oficisto en malproksimaj landoj, i. a. ankaŭ en Ĉilio. Al Ĉeĥoslovakio li ne plu revenis. Antaŭ kelkaj jaroj li transloĝiĝis el Santiago al Novjorko en Usono. Tie li grave malsaniĝis, perdis parte la vidpovon kaj aŭdkapablecon kaj mortis en ĉirkaŭbrako de sia amata edzino la 23-an de majo 1966.

Nur nun ni sciigis pri la forpaso de s-ano Kühnl. Sur honora loko en lia novjorka loĝejo staras ujo kun cindro de lia korpo. Sinjorino Otylie Kühnlová ornamas ĝin per freŝaj floroj. Ni sendas al ŝi nian kondolencesprimon kun peto, ke niajn florojn, kiujn ni ĉi supre verkis, ŝi aldonu al la siaj kaj almetu al la cindra ujo.

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

## INTERESA TROVAĴO EN ZBYSLAV

Al ĉeĥoslovaka esperantistaro, — almenaŭ al ties pli aĝa parto, estas bone konata la nomo de František Vladimír Lorenc. La kaŭzo estas evidenta: F. V. Lorenc estas la aŭtoro de la unua Esperanto-lernolibro por ĉeĥoj, aperinta en la jaro 1890. Krom tio li estas fame konata kiel tradukisto. Lia „Diverskolora bukedeto” enhavas tradukojn de poemoj el kvardek diversaj lingvoj en Esperanton. Konata estas ankaŭ lia Esperanta traduko de la verko Bhagavad-Gita el la sanskrita originalo.

F. V. Lorenc naskiĝis en la jaro 1872 en vilaĝo Zbyslav, distrikto Kutná Hora en meza Ĉehujo. Ekde 1890 li estis ĵurnalisto kaj partoprenis la progresan junularan movadon, (tiel nomita „Omladina”). En 1893 li elmigris Brazilon, kie li post longa kaj peza serĉado de vivrimedo ricevis postenon de ŝtata oficisto kaj poste fariĝis instruisto kaj lernejestro en Dom Feliciano, en la ŝtato Rio Grande do Sul. Tie li travivis la plimulton de sia vivo.

Siatempe li estis adepto de reformemaj streboj en Internacia Lingvo, — li fariĝis idisto kaj pli malfrue nov-esperantisto. Estas eĉ konate, ke li mem provis krei propran projekton de internacia lingvo. Sed fine li revenis al Esperanto, konvinkiĝinte, ke la internacia lingvo de Zamenhof estas la plej simpla kaj plej pertekta.

En lia naskiĝloko, en Zbyslav, logas lia nevo Ladislav Lorenc. Li posedas kelkajn valorajn memorajojn, kiuj donas pli klaran bildon pri la cirkonstancoj de la vivo de tiu eminenta homo. Menciindaj estas la familiaj letero, kiujn sendadis F. V. Lorenc el Brazilo al sia frato Jan Lorenc en Zbyslav. Troviĝas tie entute 12 letero, skribitaj ĉeĥe ekde la jaro 1908 ĝis 1948.

Post la morto de F. V. Lorenc lia filo Valdomiro daŭrigis la perleteran kontakton kun siaj parencoj en Ĉeĥoslovakio. Ĉe lia kuzo Ladislav Lorenc en Zbyslav troviĝas kvar liaj letero, skribitaj ĉeĥe; la lasta el la jaro 1960. El ĉiuj menciiitaj letero ni interalie ekscias, ke F. V. Lorenc zorgis pri grandnombra familio. Krom instruista okupiĝo li laboris ankaŭ kiel kuracisto. En la letero estas mencio pri lia literatura agado. Li skribis al sia frato pri eldono de lia traduko de „Paradizo de la

Koro" de Komenius, kaj, ke li verkis biografion de Komenius en portugala lingvo. Ĉe kelkaj leteroj estas aldonitaj fotoj.

Krom la leteroj troviĝas en Zbyslav memorajoj pri pli frua tempo, pri juneco de Lorenc. Estas tie notkajero el studentaj jaroj, enhavanta notojn pri studio de slavaj kaj antikvaj orientaj lingvoj. Krom tio troviĝas kelkaj kajeroj de ĉeĥe skribita kaj mane multobligita studenta gazeto. Ili enhavas kelkajn romantikajn poemojn, kies aŭtoro en plimulto verŝajne estas Lorenc mem kaj artikoloj pri rusa gramatiko, verkitaj same de li mem. Laŭ tio oni povas konsideri, ke la junia Lorenc tre serioze okupiĝis pri lingvoj kaj havis tre profundajn kaj admirindajn konojn.

Pri okupiĝo pri lingvistiko atestas plejparte la letero, skribita en Esperanto la 16-an de septembro 1890 en Zbyslav. La letero konsistas el du folioj. La unua enhavas kvar dense skribitajn paĝojn kaj la dua unu plenskribitan paĝon. La dua paĝo de la dua folio estas vaka. La letero estis nek finita, kaj, kiel aspektas la afero, nek forsendita. Al tiu ĉi kaŭzo ni povas danki, ke ĝi restis en Zbyslav, kaj ke familio Lorenc povis ĝin konservi ĝis nun. La letero ne estas subskribita, sed la komparo de manskribo kaj la unikeco de tiu ĉi fenomeno konfirmas, ke ĝin skribis Lorenc. Estas

ja evidente, ke en koncerna tempo, nome en Zbyslav, neniu alia povis skribi la leteron, nur Lorenc mem. Bedaŭrinde, ankaŭ la adreso mankas, tial ni ne povas ekscii, al kiu la letero estis sendata.

La enhavo de la letero estas filologia studo, temanta pri fonetiko de slavaj lingvoj. Lorenc en ĝi volas konatigi sian kunkorespondanton kun sonoj de slavaj lingvoj, la antikve slavan inkluzive. La unuopajn sonojn li komparas kun sonoj en la angla, franca kaj germana lingvoj. Li kreis ampleksan tabelon de sonoj.

Respondi la demandon, al kiu li skribis la leteron, estos tasko tre malfacila. Sed tamen troviĝas en la letero mencioj, kiuj donas esperon trovi la nekonatan kunkorespondanton. La detala klarigo de la temo en la letero kondukas nin al la supozo, ke li apartenas al neniu slava nacio. Tiun ĉi supozon refutus la mencio, en kiu Lorenc skribas, ke la kunkorespondanto konas la rusajn sonojn, kaj ke li „jam konas“ ankaŭ la ĉehajn. Sed tio estas klarigebla: Lorenc eble pri tio skribis en antaŭaj leteroj.

Unu loko en la letero estas pli multe direktodona. Klarigante la sonojn en la pola lingvo li skribas: „La „ł“ Vi konas elparoli, ĉar ĝi ekzistas en la irlanda lingvo; mi pensas, ke la angla „l“ en vortoj „all, bold, hill“ — sonoras tiel same.“ Laŭ tio altrudiĝas la supozo, ke la kunkorespondanto povis esti irlandano, aŭ anglo.

Ni esperu, ke iam oni sukcesos ekscii la nomon de tiu esperantisto, al kiu la letero estis sendata. La letero havas certan valoron, ĉar ĝi estas atesto pri praktika uzo de Esperanto en tiel frua tempo — nur tri jarojn post la apero de la unua libro de Zamenhof.



V. Lorenc kun siaj filoj en Brazilo

Ladislav Cibur

## Esperanto-konferenco en Rostock

Post la 51-a UKE en Budapeŝto mi invitis miajn amikojn, gesinjorojn Köster el Rostock, viziti Slovakion, kaj mi konatigis ilin kun la natur-belaĵoj de nia regiono. Reciproke ni estis invititaj viziti GDR. Mi fiksas la datan de nia vizito en la tempo de la 10-a jubilea Baltamara Semajno (9. 7. — 16. 7. 1967). Jam dumvoje al Rostock, en Dresdeno, mi havis feliĉon renkontiĝi kun mia amiko Marin Bacev el Sofio, kiu samtempe vizitis Germanujon. Ni renkontiĝis en la stacidomo, kaj ĝis la forveturo de la rapidvagonaroj ni amike babilis esperantlingve. En Rostock jam atendis nin nia germana amiko Paul Köster. Matene ni jam vizitis la urbon Warnemünde, kiu ĝis tiam por ni estis konata nur el bildkartoj, kaj tie ni vidis unuafoje en la vivo — la maron! Kompreneble la plej alloga programero de nia vizito estis Esperanto-konferenco de la baltamaraj landoj, kiu okazis en la kadro de la 10-a „Baltamara Semajno”. La konferenco okazis en luksa klubejo de la germana Kulturligo, kaj dum la interkona vespero ni havis eblecon konatiĝi kuin kelkaj elstaraj esperantistoj, inter ili kun Prof D-ro Bokarev kaj Podkaminer el Sovetunio, Prof. D-ro Falkenhahn el Berlino, John Skegeklint el Svedio kaj multaj aliaj. Tre interesaj estis la prelegoj de Prof. D-ro Podkaminer (La kontribuo de esperantistoj por konservado de la paco), de John Skogeklint (La taskoj kaj perspektivoj de la Esperanto-movado en la skandinaviaj landoj), de Prof. D-ro Bokarev (La internacia lingvosituacio kaj eblecoj de raciigo), de D-ro prof. Falkenhahn (Pri la strukturo kaj kapableco de la internacia lingvo Esperanto), kaj de Rudolf Hahlbohm (Pri kelkaj aspektoj de la Esperanto-terminologio en oficialaj vortaroj).

Tre interesa estis la duontaga ŝip-ekskurso en Rostock kaj Warnemünde, kiam la ŝipo eĉ eniris la maron. Sed neforgesebla por ni restis la tuttaga ekskurso per ŝipo al la insuleto Hiddensee. Ni ankaŭ partoprenis la solenan manifestacion en la urbo, kaj Esperanto-ekspozicion, kiun preparis esperantistoj el Rostock. En kelkaj gravaj gazetoj aperis artikoloj pri Esperanto-konferenco kaj pri ĝiaj traktadoj. Nia vizito en granda ŝipfarejo en Warnemünde, trarigardo de uzina polikliniko, renkontiĝo kun kelkaj esperantistoj-komencantoj en la fabriko kaj partopreno dum la surakvigo de novekonstruita ŝargŝipo — apartenas al niaj agrablaj travivajoj ĉe la Balta maro.

Post 10-taga restado en urbo Rostock, en agrabla esperantista medio, ni feliĉe revenis hejmen. Niaj rememoroj nun apartenas al ĉiuj esperantistoj el la urbo Rostock, kiuj preparis sukcesan konferencon, kaj kiun partoprenis ĉirkaŭ 70 esperantistoj el 7 landoj, kaj al gesinjoroj Köster, kiuj gastigis nin dum nia restado en Rostock.

(D-ro Nekuda)

**Kiu pagos la venontan numeron?** Gesamideanoj — la abono, tre malalta, ne suficios. Klopodu prizorgi donacojn, monsubtenojn en ĉiu formo; anoncojn. Skribu al la redaktanto! Antaŭdankon!

## INFORMACE PRO E-KROUŽKY

Stálou slabinou činnosti většiny esp. kroužků je nedostatečné plánování. Kroužky si musí uvědomit, že nejde o zbytečnou administrativu, ale že zřizovatelé kroužků mohou podporovat pouze ty akce, které byly včas zařazeny do plánu činnosti i s vyčíslením předpokládaných nákladů. Kromě toho má plánování ještě několik dalších aspektů: kroužky získají přehled o tom, kolik peněz mohou během roku vydat, plánované esperantské akce se tak dostanou prostřednictvím plánu zřizovatelské organizace též do plánu rozvoje kulturní a osvětové činnosti okresu, který je projednáván a schvalován kulturními, státními i stranickými orgány. Tím tyto akce dostanou oficiální ráz a odpovídají všem požadavkům po stránce právní, materiální i politické. Současně se tímto plní i funkce informační a popularizační v orgánech a institucích, které mají mnohdy o činnosti kroužku a esperantu vůbec nejasné a nesprávné představy.

Rovněž ČSEV potřebuje být o Vašich plánech předběžně informován, aby mohl koordinovat větší a kce. Jinak se stane, že během jednoho měsíce se koná řada různých krajových akcí, mnohdy i ve stejných termínech. Tyto akce nelze potom ani obeslat zástupci ČSEV a dalších orgánů, ale tříští se i zájem esperantské veřejnosti. Hodláme zpracovat každoročně souhrnný kalendář větších kulturních akcí, do něhož budou zařazovány pouze ty akce, které budou předem naplánovány. Akce, u nichž nebude možno zaručit řádnou náplň, návštěvnost a podporu, nebudou doporučovány, ani do plánu ČSEV zahrnovány.

Při sestavování návrhu plánu doporučujeme, abyste se řídili pokyny svého zřizovatele a přihlíželi k zásadám „Akčního plánu ČSEV“, který byl otiskněn v našich „Mimořádných zprávách“ z února 1965.

Aktuálním úkolem esp. kroužků je též spolupráce v komisích cestovního ruchu měst a okresů. Státní organizace zvládají nynější konjunkturu cizineckého ruchu jen s velkými potížemi a vítají každou pomoc. Považujeme za nejvhodnější sdělit jim písemně, že vzhledem ke stále rostoucímu turistickému ruchu a přílivu cizinců do naší země jste se rozhodli ke spolupráci a sdělujete jméno soudruha, který je pověřen zastupovat esp. kroužek v komisi turistického ruchu. Současně je třeba objasnit o jaký druh spolupráce se bude jednat: průvodci cizinců, informátori při velkých celostátních akcích, překladatelé apod. Přitom je možno nabídnout i napsání, překlady nebo mutace různých propagacních pomůcek a jejich rozeslání pomocí EK do zahraničí; to vše podle schopností, znalostí a možností Vašich členů (podle podmínek za obvyklou úplatu).

Stejně tak doporučujeme spolupracovat s podniky a organizacemi pracujícími pro export, nabídnout jim pomoc, ukázat na velké možnosti esperantské propagace. Doporučit jim vydání prospektů, propagacních tiskovin, pohlednic, inserci v časopisech. PACO a Zprávách ČSEV, suvenýry s esperantským textem, články a zprávy v zahraničním tisku.

Ale pozor! Veškeré esperantské tiskoviny kromě normálního schválení a povolení tiskového dohledu ONV podléhají ještě povinné Korektuře o d p o v ě d n ý m i j a z y k o v ý m i o d b o r n í k y . Toto opatření musí být bezpodmínečně dodržováno, aby od nás šly do zahraničí jen tiskoviny nezávadné i po

stránce jazykové.

### **Pokud navrhujete**

a) významnější kulturně společenskou větší akci (doporučujeme její pořádání podle možnosti společně s některou veřejnou organizací nebo institucí),

b) vydání esperantské knižní nebo jiné důležitější publikace (nezbytně ve spolupráci s odpovědným jazykovým odborníkem!).

Pošlete předem konkrétní informace!

U akcí se zahraniční účastí požadujeme, aby nám pořádající esp. kroužky podávaly 3 týdny před jejich zahájením zprávu o počtu přihlášených zahraničních účastníků podle zemí (pokud půjde o funkcionáře a významné osoby též podle jmen) v zájmu celkového přehledu a informovanosti ČSEV. Toto veďte trvale v patnosti.

## **ČESKOSLOVENSKÝ ESPERANTSKÝ VÝBOR**

Ing. F. Sviták v. r. předseda  
T. Balda v r. jednatel.

**Grava akcidento de D-ro T. Pumpr.** Kun granda bedaŭro ni sciigis, ke nia alt̄satata kunlaboranto ankoraŭ ne resaniĝis post la glitfalo sur infana glitkurejeto, kovrita per freša neĝo, okaze de la renkontiĝo en Pardubice. Rompiĝis lia dekstra femur-kolo kaj li devas ankoraŭ kuŝi en malsanulejo. La samideanoj estas petataj respekti lian sanstaton kaj ne postuli de li respondojn, klarigojn k. s. Dankon.

D-rino Magda Šatura

## **EÜROPA ESPERANTO-KONFERENCO**

La Konferenco okazis en la aŭstria urbo Innsbruck la 23.-30. 7. 67, sub la alta protekto de D-ro Alois Lugger, urbestro de Innsbruck. La urbestro salutis la ĉeestantaron ĉe la solena inaŭguro, kies festparolanto estis s-ano Tibor Sekelj, la 24-an de julio. Poste sekvis komuna fotografado kaj unuopaj fakkunsidoj de ILEI, IOE, IAJE. La saman tagon okazis vespera diservo katolika kaj poste oni prezantis lumbildprogramon kun prelego pri Tirolo kaj Novzelando.

La 25-an okazis la prelego de D-ro Wilhelm Herrmann pri Psikologia Integracio helpe de komuna lingvo. Sekvis enkonduka parolado de s-ano Helmut Illetschko pri la celoj de ITSE kaj poste diskuto kaj konstitucia kunsido de ITSE. La saman tagon kunsidis MEL kaj IKUE. Vespare okazis balo en la granda festsalono de Olimpa vilaĝo, kie estis aranĝitaj ĉiuj programeroj de la Konferenco.

La 26-an merkrede okazis ekskurso „A“ al Seefeld, Telfs kaj abatejo Stams, ĝis la Eŭropa Ponto.

Jaŭdo, la 27-a de julio, apartenis denove al laborprogramo, kiu komenciĝis matene per parolado de dipl. ing. Hermann Schalk pri la projekto de Eŭropa Esperanto-Revuo. En diskuto partoprenis tre fake s-ano T. Sekelj; elektita komisiono preparos du projektojn por tiu ĉi Revuo, kiu fariĝos organo de ĉiuj Eŭropaj esperantistaj asocioj. Sekvis fakkunsidoj, de ISAE, IGA, ILEF, ILEI kaj daŭrigo de vigla diskutado pri la prelego de D-ro Herrmann pri komuna lingvo. Posttagmeze

kelkaj interesuloj trarigardis la bierfarejon „Adambräu”. Vespere prezantis la Studenta Esperanto-Klubo el Zagreb tre altnivelan teatran programon. Ili ludis la komedion „Urso” de Ĉehov kaj prezantis humorajn unuaktaĵojn kaj kabaredaĵojn kaj poezian recitadon el la verkoj de Julio Baghy. La programo de tiu ĉi juna studenta teatra aro estis brila sukceso.

Vendrede, la 28-an de julio, okazis ekskurso „B” al kastelo Ambras, Wörgl, Niederschönaŭ kaj iago Achensee. Alia parto de la ĉeestantaro trarigardis la internan parton de la urbo Innsbruck, kiu — kvankam havanta nur 110 000 da loĝantoj — meritas nomon de grandurbo, ĉefe pro la brila ordo kaj pureco, kiu taŭge substrekas la agrablan tirolan atmosferon de vigla urbo, situanta en valo inter grandegaj alpaj montpintoj, super kiuj regas kvazaŭ bastiono la majesta Serles kaj eternaj, neĝokovritaj pintoj de Alpoj. Ne vane la loĝantoj de Tirolo kantas pri la beleco de sia regiona ĉefurbo Innsbruck, kiu etendiĝas en valo kaj sur deklivoj ambaŭflanke de la rapidega kaj forta rivereto Inn.

Sabate, la 29-an de julio okazis rezolucioj pri la decidoj pri Eŭropa Esperanto-Revuo kaj ITSE, poste prelego de s-ro Ernst Werner pri Somera Universitato kaj fine sekvis adiaŭa kunsido. Vespere oni prezantis kelkajn Esperantofilmojn (pri FIAT, Novzelando kaj Hungario).

Dimanĉe, la 30-an de julio, kelkaj ĉeestantoj partoprenis trarigardon de la urbo Innsbruck. La Organiza Komitato tre bone zorgis pri ĉiuj aranĝoj ĉu sur la kampo organiza aŭ societa. Apartan laŭdon meritas nia tre ŝatata amiko kaj longjara samideano D-ro Adolf Halbedl el Knittelfeld, kies saĝaj konsiloj kaj trafaj diskutadoj vekis ĉies simption. Aparta doloro trafis la korojn de ĉiuj ĉeestantoj, kiam ili eksciis la tragikan forpason pro aŭtomobila akcidento dum la unuaj tagoj de la Konferenco. Sinceran kunsenton al nia kara s-ro Walter Mudrak kaj honoron al la brila personeco de lia neforgesebla edzino esprimas ni refoje ankaŭ ĉi-loke.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

## 1968 - JARO DE UEA

La du fundamentaj celoj de UEA, nedisigebaj unu de la alia, estas disvastiigi la Internacian Lingvon kaj krei aŭ antaŭenigi kondiĉojn por ĝia kiel eble plej vasta utiligado en la praktiko.

Al la du ĉefaj celoj respondas tuta aro da taskoj, difinitaj en la Statuto, regularoj, Laborplano kaj en konkretaj decidoj de la Komitato, Estraro kaj aliaj instancoj, konforme al iliaj roloj kaj kompetenteco sur ĉiuj niveloj: internacia, landa, regiona aŭ loka kaj faka aŭ speciala. La taskoj, subigitaj al la bazaj celoj, rilatas al esploroj, dokumentado, informado, intervenoj, kampanjoj en konvenaj momentoj, instruado en la plej larĝa senco de la vorto, ĉiaspecaj praktikaj servoj ekde kreado sur la kultura kampo, tra internaciaj intelektaj interŝanĝoj, ĝis la uzo de la lingvo por turismaj kaj ĉiutagaj bezonoj.

La multnombroco kaj varieco de la taskoj ne malofte kaŭzas iom da konfuzo kaj oni renkontas personojn, kiuj demandas sin mem kaj aliajn kio estas la plej grava.

Ĉu, ekzemple, pli grandan signifon havas nia literaturo, aŭ la ĝeneralaj enkondukoj de la lingvo en la lernejojn; ĉu estas pli utile objektive informadi pri la Internacia Lingvo, aŭ uzi ĝin en la praktiko, kaj simile. Kelkaj eĉ ne starigas la demandon en la formo „pli-aŭ”, sed rajdas sian plej amatan ĉevalidon kaj pensas, ke nur pere de tiu ĉevalido oni povos atingi tion, kion oni kutimas nomi „la fina venko”, aŭ, alivorte, la ĝeneraligon de la uzo de Esperanto en la internaciaj rilatoj. Efektive, nenio estas pli grava ol io alia, ĉar ĉio, absolute ĉio estas dependa de ĉio alia. Oni certe ne povas atendi la praktikajn aplikojn, se oni samtempe ne altigas la nombron de personoj parolantaj la lingvon; nek oni povas sukcese instruadi, nome instruadi al plenaj klasĉambroj, se oni ne altiras al la lernejaj kaj eksterlernejaj kursoj novajn gelernantojn per inteligenta informado; nek oni povas informadi la publikon pri kio ajn valora, se efektive nenio inda je mencio okazas. La sola eliro el tiu ŝajne ensorĉita cirklo estas konscie planita kaj konscience plenumata paralela, samtempa, pacienca agado en ĉiuj direktoj kaj sur ĉiuj niveloj, tiel ke unu ero apogu la alian kaj ĉiuj kune la bazajn celojn.

En la sino de UEA troviĝas entute 24 fakaj aŭ specialaj internaciaj organizacioj. Kelkaj el ili atingis bonajn rezultojn en sia laboro; aliaj pro diversaj kaŭzoj iom stagnis; pluraj estas tute novaj, sen sufice da spertoj. Kvankam ĉiu el la priparolataj organizacioj havas siajn proprajn specifajn problemojn, kiujn nur ĉiu el ili povas solvi, tamen ekzistas granda nombro da demandoj komunaj al ĉiuj internaciaj fakaj organizacioj.

La instruado de Esperanto en la lernejoj, vesperaj kursoj kaj en aliaj formoj estas ĉiam aktualaj, sed hodiaŭ eble pli aktualaj ol iam antaŭe, pro la pli bonaj ŝancoj en diversaj landoj kaj ĉar la Konsulta Komisiono pri Lernejoj klopodas harmoniigi la instruadon kaj la interlernejan kunlaboradon.

Jam delonge la Internacia Lingvo estas utiligata por turismaj celoj. Centoj da prospektoj kaj multaj gvidlibroj pri diversaj landoj, regionoj aŭ urboj jam pli frue aperis en Esperanto. Tamen, pro la Internacia Jaro de Turismo, UEA komencis realigadi kelkajn ideojn tuj post la kongreso en Hago. La plej menciiinda rezulto estis la fondo de Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista, iniciatita kaj lerte gvidata de sinjoro Maurice Jaumotte, Antaŭ nelonge komencis aperadi nova kvaronjara revuo „Esperanto-Turismo”, redaktata, same kiel la Aŭto Revuo, de sinjoro Maurice Jaumotte. Apartan aplaŭdon meritas la Esperanto-versio de ta luksega revuo „Ripozoj”, regule eldonata en Bulgario.

Aparte mi mencias Internacian Artan Teatron, kiu en tiu ĉi jaro festas 10-jaran datrevenon de sia naskiĝo. Mi gratulas al la gvidantoj kaj geaktoroj de I. A. T., pro atingoj akiritaj en la 10 jaroj de sia agado en malfacilaj cirkonstancoj — ni ja ĉiuj laboras en tiaj malfacilaj kondiĉoj.

# EL NIAJ RONDETOJ

AGADPROGRAMO DE ESPERANTO-GRUPOJ EN LA ĜEMELIĜO INTER LA URBOJ ROMANS KAJ GOTTWALDOV

Prizorgadi ĉiun korespondadon en Esperanto, koncernantan la ĝemeliĝon, inter la organizaĵoj aŭ reprezentantoj de niaj urboj.

Informi regule la gazetaron de ambaŭ urboj pri ĉiuj eventoj de la ĝemeliĝo.

Traduki ĉiujn artikolojn kaj recenzojn en la gazetaro pri la ĝemeliĝo kaj interŝanĝi ilin por reciproka aperigo en la naciaj gazetoj.

Interŝanĝi Esperantajn publikajojn (event. ankaŭ alilingvajn), kiuj povus interesi la loĝantojn de niaj urboj.

Informadi ankaŭ la landajn Esperanto-Asociojn, por ke ili pere de siaj bultenoj povu sciigi la esperantistojn de niaj landoj.

Montri al la entreprenoj de niaj urboj, ke la esperantistoj povas esti utilaj al ili diversflanke: ekz. en la akirado de fakaj sciigoj. La librejo de la nacia entrepreno SVIT posedas vortaron de la ŝu-fako en 8 lingvoj: angla, franca, germana, hispana, itala, sveda, nederlanda kaj Esperanta. Se estos serĉataj iuj fakesprimoj, ni povas ilin kopii el la vortaro kaj transsendi. Ni povas traduki iajn ajn fakajn artikolojn k. s. pri kio estos intereso.

Traduki okaze de oficialaj vizitoj kaj paroladoj, diskutoj, interkonsiliĝoj de la reprezentantoj de niaj urboj aŭ entreprenoj.

Fari komunan propagandon pri la ĝemeliĝo kaj kunlaboro de niaj rondetoj helpe de gazeteltondaĵoj, fotoj, en montraj kestetoj kaj en la kluboj helpe de diapozitivoj, sonbendoj ktp.

Interŝanĝadi la adresojn de niaj rondetanoj, kiuj volas labori por tiu ĉi celo kaj korespondadi.

Ĉe okazaj vizitoj de kongresoj, esperantistaj renkontiĝoj en la najbaraj landoj, ligi personajn kontaktojn por interkonatiĝo kaj pridiskutado de ĉiuj problemoj de la ĝemeliĝo.

## BRNO

Memore al D-ro L. L. Zamenhof kaj omaĝe al 80 jaroj de Esperanto la brna esperantistaro la 9-an de decembro 1967 solenis ambaŭ eventojn per koncerta vespero. Ĝi okazis en la halo de Konservatorio kaj la brilan programon preparis Prof. Vilibald Scheiber. Kantis kaj ludis la plej famaj artistoj de Janáček-opero en Brno, s-rino Helena Supová-Halířová kaj V. Halíř, Prof. Arnošt Jíra kaj s-rino Božena Kalábová-Němcová. Ĉiuj arioj kaj kantoj estis prezентitaj en Esperanto, kaj ĉiujn programerojn sekvis neĉesanta kaj entuziasma aplaŭdo. Festparoladon havis J. Vondroušek. Ĉeestis pli ol 140 personoj, inter ili ankaŭ sveda esperantistino el Stokholmo, kiu mallonge alparolis la partoprenantojn.

El la plua agado ni menciu la jenon. La klubo abonas 15 Esperanto-revuojn po 2-6 ekz. Zprávy-Informojn abonas jam 109 membroj de la klubo. Aŭtune al ĉiuj lernejoj de la urbo estis senditaj informletero pri la Internacia Lingvo kaj al ĉiuj redakcioj ampleksaj informoj pri Esperanto kaj la movado. Rezultis favoraj artikoloj en la gazetaro. Sed pro la altega kursopago (Kcs 170.—) kaj ankaŭ neeblo varbi por

la kurso per propraj afișoj, (nura mencio pri Esperanto, apud pluraj lingvo-kursoj sur la afișo de Distrikta Kultura Centro tute ne sufiĉas), aliĝis nur 8, inter ili fama artisto. Instruas J. Vondroušek.

**Mělník.** Okaze de la vizito de gesamideanoj el Drezdeno (Germana Demokratia Respubliko), Esperanto-rondeto de la 9-jara Baza Lernejo en Mělník (Bohemio) aranĝis la 19-an de novembro 1967 renkontiĝon en la ubra kastelo. La partoprenintoj vizitis la bildgalerion, komune tagmanĝis en la kastela vinejo kaj posttagmeze faris aŭtobusan ekskurson en la Kokořín-valon.

## TÁBOR

La kunvenoj okazadas ĉiulunde vespere en Domo de Kulturo Střelnice. Vintre okazis du kursoj. Dum la klubaj kunvenoj la membroj perfektigas siajn lingvokonojn per tradukado el gazetoj, novaj libroj kaj per legado de la alvenintaj eksterlandaj leteroj. Ing. L. Krajíć partoprenis dialogon kun la redaktoro de la radio: ĝi estis elsendita la 17. de decembro 1967 en České Budějovice. La regiona organo de Kompartio en Č. B. „Jihočeská Pravda“ dufoje monate aperigadis 25-linian rubrikon kun informoj pri Esperanto en- kaj eksterlande. La rubriko aperis 10-foje, sed post la Nova jaro pro la reorganizo de enhavo de la distrikta gazetoj, ne plu. La klubo anoncis 15 membrojn al la centra kartoteko kaj klopodas varbi pluajn kiel abonantojn por Zprávy-Informoj.

## INTERNACIONA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA

Jozefo Kavka, landa delegito de ISAE por Ĉeĥoslovakio (adr.: Lužná 7, PRAHA 6 — Vokovice) dissendis en januaro la 11-an n-ron de sia informa cirkulero. Ĝi entenas la liston de 178 ISAE-interesatoj en ĈSSR fine de la jaro 1967, krome la peton de s-ano Kavka, al helpemaj samideanoj, pri kunlaboro. La neatendite kreskinta agendo kun la klopoj pri la oficialigo de Esperanto en Internacia Geologia Kongreso en Prago, ne povas esti plenumata nur de unuopulo, sed bezonas sisteman laboron de ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

**Mortis Ferenc Szilágyi** (silaadji) hungaro vivanta en Svedio, eldonanto kaj cefredaktoro de Norda Prismo, mondkonata verkisto. Li apartenis al la t. n. Budapešta skolo poezia. Post forpaso de Julio Baghy jen la dua gravega perdo por la tutmonda Esperanta literaturo.

## PARBUBICE 9-10. 12. 1997

II. stretnutie východočeských esperantistov v Kultúrnom dome ROH na Dukle nieslo pečat premyslenej starostlivosti s. Franca a jeho spolupracovníkov, ktorí sa osobne starali o každú podrobnosť, takže organizácia bola bez najmenšej chyby. Účastníkom odovzdali cenný propagačný materiál z mesta i Východočeského kraja, dve čísla „Kata Gazeto“ z Hradca Králové a medovníkové srdce s nápisom „Nur por vi“.

ČSEV na svojej plenárnej schôdzi okrem prejednania a schválenia plánu činnosti a rozpočtu na rok 1968, v dlhých a opatovných debatách prerokúval návrh stanov chystanej samostatnej esp. asociácie.

Na stretnutí, po privítaní predsedom Francom, ked' predtým odzneli referáty vedúcich jednotlivých krúžkov, inž. Sviták predniesol zprávu o činnosti ČSEV a o situácii v našom esp. hnutí. Zo sekcií podali zprávu MEM, mládežnícka, zdravotnícka, ba i zástupci z iných krajov. Tak sme počuli s. Hrušku z Jablonca, prof. Kiliána z Třebiča, Drah. Kočvaru z Ostravy a J. Vítka o Lančove. Na stretnutí a najmä pri debatách o návrhu stanov nám velmi chýbal náš „esperantský právnik“ dr. T. Pumpr., ktorého hned' po príchode pre zlomeninu krčku stehrovej kosti museli previezt do nemocnice. Usporiadatelia aspoň časť stretnutia zachytili na magnetofónový pás i s pozdravom pre drahého pacienta.

ESPERANTSÝ KLUB V JABLONCI  
NAD NISOU

**připravuje třídenní**

**MÍROVĚ SETKANÍ ESPERANTISTŮ  
ČSSR, NDR a PLR**

setkání v rámci Mezinárodní výstavy bižuterie v Jablonci nad Nisou  
ve dnech 3.-5. srpna 1968

**Předběžný program:**

Vystoupení esperantského divadelního souboru z Polska,  
seznamovací večer s mezinárodním programem a tancem,  
přednáškový seminář našich předních esperantských pracovníků,  
prohlídka výstavišť v Jablonci a Liberci  
autobusové zájezdy do Jizerských hor,  
propagační výstava o esperantu atd.

**N e z a p o m e n t e ...**

že v těchto dnech probíhá v Jablonci současně celá řada akcí (Mezinárodní výstava bižuterie, Výstavní trhy Liberec a Jablonec, Mezinárodní výstava sběratelů odznaků a Mírové setkání esperantistů).

... a že pro naše setkání máme k dispozici pouze 400 lůžek a již nyní si předběžně zajistěte písemně účast na setkání!

ESPERANTSÝ KLUB JABLONEC poštovní schránka 190

ZPRÁVY ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSÝHO VÝBORU — INFORMOJ DE ČEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO — Vydává — Eldonas: Osvětový ústav v Praze, Blanická 4, Praha 2. Rediguje — Redaktas: Dr. L. Izák — s redakčním výborem — kun la redakta komitato: J. Cíchová, ing. Ed. Felix, Zd. Hršel. O. Kníchal, M. Lukáš, Dr. T. Pumpr, Ing. Fr. Sviták, Ed. V. Tvarožek, J. Vondroušek. Tisk — Preso: Tlačiarne Slov. nár. povatania, Martin. RM/39 — 67/KS NVP V-16\*81141.